# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-31 n-ro 402

# UNICEF alarmas pri la perfortoj suferitaj de la infanoj en la mondo




EU decidis liveri urĝan helpon al Filipinoj trafitaj de tropika ŝtormo

Kiel feliĉe centjariĝi

Opozicia sekcio de Sirio eltiriĝis el sudokcidenta parto de Damsko

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

UNICEF alarmas pri la perfortoj suferitaj de la infanoj en la mondo
*Infanoj estas rektaj viktimoj p. 03*

Diplomatio ankoraŭ estas ĉefa rimedo por solvi nuklean problemon de Korea Duoninsulo
*Diplomatiaj kaj ekonomiaj rimedoj en internacia komunumo p. 04*

EU decidis liveri urĝan helpon al Filipinoj trafitaj de tropika ŝtormo
*570 000 eŭroj p. 05*

Opozicia sekcio de Sirio eltiriĝis el sudokcidenta parto de Damasko
*Laŭ la interkonsento atingita kun la siria registaro p. 05*

Kiel feliĉe centjariĝi
*Estu diligenta, amu la familion - kaj restu obstina p. 06*

Hodiaŭe
*Giovanni Pascoli; Gottfried August Bürger; Viktor Dyk; kaj Gambio p. 07*

# UNICEF alarmas pri la perfortoj suferitaj de la infanoj en la mondo

En raporto publikigita ĵaŭdon [28 dec 2017], la organizaĵo de UN resumas la situacion de la infanoj tuŝataj de la konfliktoj en la mondo. Ĝi memorigas, ke milionoj da infanoj estas de ili rektaj viktimoj.




En pluraj konfliktoj en la mondo, la infanoj estas celoj, uzataj kiel homŝildoj, mortigitaj, vunditaj, kaj rekrutigataj por batalo, laŭ raporto de UNICEF, (Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Urĝa Helpo al Infanoj), publikigita la 28-an de decembro.

«La infanoj estas rekte celataj, kaj submetataj al atakoj kaj perfortoj, en iliaj hejmoj, iliaj lernejoj, aŭ ludejoj», eksplikas Manuel Fontaine, la direktoro de la urĝaj programoj ĉe UNICEF. «Tiuj atakoj kontraŭ la infanoj daŭras, jaron post jaro, ni ne povas restadi senmove. Tia perforto ne devus normaliĝi», li aldonis.

La agentejo de UN mencias ankaŭ seksperfortojn, trudedzigojn, forkaptadojn aŭ sklavigon, uzadon en la konfliktoj en Irako, Sirio, Jemeno, Niĝerio, Sud-Sudano kaj Birmo.

En sia studaĵo UNICEF raportas, ke milionoj da infanoj estas rektaj viktimoj de tiuj konfliktoj, kaj suferas pri misnutrado. La aliro al bazaj bezonoj – kiel nutraĵoj, akvo, sanitaraj kaj sanaj flegadoj – estas rifuzataj al ili aŭ detruataj.

En resumo de la situacio, la organizaĵo memorigas, ke:

**Infanoj estas endanĝerigitaj en la konfliktoj, kiel soldatinfanoj**

En Somalio, dum la dek unuaj monatoj de la jaro 2017, 1 740 kazoj da rekrutigo de infanoj estis raportitaj en la celo partoprenigi ilin al bataloj. Nord-oriente de Niĝerio kaj en Kamerunio, la ĝihadista grupo *Boko Haram* trudis almenaŭ 135 infanojn partopreni al memmortigaj atakoj, transformante ilin en homajn bombojn. Tiu nombro estas almenaŭ kvinoble supera ol la nombro de 2016.

En Sud-Sudano, pli ol 19 000 infanoj estis rekrutigitaj en armitaj grupoj, kaj pli ol 2 300 infanoj estis mortigitaj aŭ vunditaj de post la komenciĝo de la konflikto, en 2013.

**Loĝantaroj estas devigataj fuĝi**

En la regiono *Kasaï*, Demokratia Respubliko Kongo, la perfortoj survojigis pli ol 850 000 infanojn, kaj laŭ la organizaĵo, pli ol 200 kuracejoj kaj 400 lernejoj estis atakitaj.

Sud-Oriento de Azio ne estas domaĝita. En Birmo, ankaŭ la formigrado de la

Rohingjoj tuŝis la infanojn, kiuj fuĝis al najbara Bangladeŝo. Pli ol duono el la Rohingjoj, kiuj fuĝis la persekutojn en Birmo, aĝas malpli ol 18-jaraj.

**Infanoj estas uzataj kiel homŝildoj**

En Irako kaj Sirio, la agentejo raportas, ke infanoj, kaptitaj en sieĝoj de pluraj urboj tuŝataj de la milito, travivis intensajn bombadojn, kaj kelkfoje estis uzataj kiel homŝildoj.

**Ne plu celi la lernejojn**

Fine, la raporto de UNICEF memorigas, ke eĉ kiam la konflikto ne rekte celas la infanojn, tiuj ĉi estas tamen viktimoj, pro ĉeesto de kontraŭpersonaj minoj, kaj restaĵoj de eksplodaĵoj. Tio okazas oriente de Ukrainio, kiu fariĝis unu el la regionoj de la mondo «plej infektitaj de minoj».

En sia raporto, la agentejo de UN postulas de la ŝtatoj, kaj de la partoprenantoj al konfliktoj, ke ili ĉesigu tiujn perfortojn kontraŭ la infanoj, kaj ne plu bombadu la lernejojn kaj malsanulejojn.

En marto, UNICEF jam alarmis pri la situacio de la infanoj en Sirio memorigante, ke 6 milionoj el ili dependas de la humanitara helpo en la lando. En tiu regiono, unu infano el tri travivis nur militon.

Neniam Milito Inter Ni

## Diplomatio ankoraŭ estas ĉefa rimedo por solvi nuklean problemon de Korea Duoninsulo

Kanado Usona ŝtata sekretario Rex Tillerson diskutos kune kun kelkaj landoj pri la pluaj agadoj pri la problemo. Tio montras, ke Usono ankoraŭ prenas diplomation kiel la ĉefan rimedon por solvi la nukelan problemon de Korea Duoninsulo.



Vendrede [29 dec 2017] Usona nacidefenda ministro James Mattis diris en gazetara konferenco, ke Usono ankoraŭ prenas diplomation kiel ĉefan rimedon por solvi la nuklean problemon de Korea Duoninsulo.

James Mattis diris, ke Usono prenas diplomatiajn kaj ekonomiajn rimedojn en internacia komunumo. En la venonta januaro en

James Mattis diris ankaŭ, ke oni eble ŝanĝos la daton de la komuna manovrado nome Cindrogriza Vulturo inter Usono kaj Sud-Koreio. Li diris, ke estas ordinara afero, ke ŝanĝiĝos la dato de manovrado pro iuj kialoj.

Pluveta
Ĉina Radio Internacia

# EU decidis liveri urĝan helpon al Filipinoj trafitaj de tropika ŝtormo

La Eŭropa Unio ĵaŭde [28 dec 2017] deklaris liveri urĝan helpon kun la valoro de 570 000 eŭroj al Filipinoj por helpi aŭtoritatojn de la lando trakti sekvojn de la tropika ŝtormo *Tembin*.



La Ĝenerala Direkcio de la EU pri Humanitara Helpo kaj Civila Protekto tiutage publikigis avizon, dirante, ke la EU planas asigni 570 000 eŭrojn, kiuj estos uzataj por helpi suferintojn de la katastrofo en Filipinoj, precipe la plej vundeblajn familiojn en la insulo Mindanao. La avizo diris, ke la EU liveros al la suferintoj plej urĝe bezonatajn materialojn. La Ĝenerala Direkcio de la EU pri Humanitara Helpo kaj Civila Protekto jam sendis specialistojn al plej severe influitaj lokoj por taksi la situacion kaj esplori bezonojn de la suferintoj.

La 22-an de decembro la tropika ŝtormo *Tembin* surteriĝis en la insulo Mindanao, estigante inundojn kaj terlavangojn. Pli ol 160 homoj mortis kaj 170 aliaj malaperis pro la katastrofo. Krome, pli ol 670 000 homoj suferis de la katastrofo kaj ĉirkaŭ 140 000 homoj estis delokitaj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Opozicia sekcio de Sirio eltiriĝis el sudokcidenta parto de Damasko

Persono de la siria milito diris, ke eltiriĝinte el Damasko la armitoj de la opozicia sekcio respektive atingos *Idlib*-provincon kaj *Deraa*-provincon.

Vespere de vendredo [29 dec 2017], laŭ la interkonsento atingita kun la siria registaro, la armitoj de la opozicia sekcio de Sirio komencis eltiriĝi el la sudokcidenta parto de Damasko.



La unua amaso da armitoj kaj iliaj familianoj de la opozicia sekcio eltiriĝintaj el Damasko aŭtobuse iris al la *Idlib*-provinco.

Pluveta
Ĉina Radio Internacia

# Kiel feliĉe centjariĝi

Kio kondukas al plenanima vivo en alta aĝo? Respondon trovis psikologoj ĉe altaĝuloj el Kampanio en Suda Italio. La formulo por la vivofeliĉo tie konsistas el jenaj elementoj: Estu diligenta, amu la familion - kaj restu obstina.



Ĉilento estas pitoreska regiono en Kampanio. La tie situanta nacia parko estas konata pro siaj deklivaj marbordoj kaj siaj sablaj strandoj, kaj ekde la jaro 1998 ĝi apartenas al la monda heredaĵo de Unesko por la homaro. En la montara regiono de Ĉilento troviĝas kelkaj mezepokaj vilaĝoj kies enloĝantoj antaŭ nelonge vekis la intereson de sciencistoj.

La atingata vivodaŭro en la vilaĝoj nome estas mirinde alta. Vivas tie centoj da homoj kiuj estas pli ol 90-jaraj aŭ eĉ 100-jaraj. La maljunegaj ĉilentanoj pasigas siajn tagojn ĉefe sub libera ĉielo, multaj el ili fumas, ili trinkas regule ruĝan vinon kaj ne malofte estas tropezaj - sed tio ne ŝajnas aparte damaĝi ilian sanon. Kun 29 el ili usona psikologo faris intervjuojn por ekscii pli pri la bona vivo en alta aĝo.

La intervjuitoj ja suferis pri la kutimaj proaĝaj sanproblemoj, sed koncerne al ilia mensa stato ili fartis bonege, eĉ pli bone ol iliaj infanoj. Kaj la psikologo renkontis ĉiam denove la samajn sintenojn kaj karakterajn trajtojn. Jen frazoj kiujn li aŭdis, ekzemple: "Mi ĉiam esperas pri la plejbono. Ekzistas ĉiam solvo en la vivo." Aŭ: "Mi estis ĉiam aktiva. Kio estas streso, tion mi tute ne scias. La vivo estas kio kaj kia ĝi estas. Oni devas alfronti la vivon ... ĉiam."

La esploristoj distilis el la intervjuoj kelkajn bazajn motivojn de la feliĉo: La kadukuloj el Ĉilento estis ĉiuj optimismaj, la familio donis al ili firman bazon, ilia vivkonduto distingiĝis per kontinueco - oni povus ankaŭ diri: Ili estis obstinaj.

"Unu el la rezultoj de nia studaĵo estas ke la psika sano de tiu kampara loĝantaro korelacias kun tre tipaj ecoj", diras la usona esploristo. "Tio estas ekzemple labordiligenteco kaj obstino, pozitiva sinteno kaj forta kunligo al la familio kaj al la religio."

Itala psikologino kiu same partoprenis en la studaĵo, resumis: "La amo al la hejma regiono donas al la vivo de tiuj homoj sencon. Plej multaj el ili ankoraŭ laboras. Ilia sinteno estas: Tio estas mia vivo, kaj pri tio mi ne volas rezigni."

Esperanta Retradio



## Giovanni PASCOLI

**Giovanni PASCOLI (naskiĝis la 31-an de decembro 1855, mortis la 6-an de aprilo 1912) estis itala poeto kaj klasika studisto.**

**En Esperanto aperis: *Thallusa; Myricae.***

**Vikipedio**


## Gottfried August BÜRGER



**Gottfried August BÜRGER (naskiĝis la 31-an de decembro 1747 en *Molmerswende* - mortis la 8-an de junio 1794 en *Göttingen*) estis germana verkisto.**

**En Esperanto aperis: *Per mirigaj aventuroj piprita vojaĝo de la barono Fonmunkhauzo.***

**Vikipedio**



## Viktor DYK

**Viktor DYK (naskiĝis la 31-an de decembro 1877 en *Pšovka*, Ĉeĥio - mortis la 14-an de majo 1931 en *Lopud*, Jugoslavio) estis ĉeĥa poeto, verkisto, ĵurnalisto kaj politikisto.**

**En Esperanto aperis: *Ondro kaj drako*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

***Chlorocebus sabaeus*, Gambio.**

**Vikipedio**